Esperanto Societo Frankfurto

Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main e.V.
gegründet 1904 – fondita 1904

oktobro 2015

# ESPERANTO INFORMILO

| Esperanto-Gesellschaft, Frankfurt am Main | 1. Vorsitzender: | Bankverbindung: | Beitrag: |
|---|---|---|---|
| www.esperanto-frankfurt.de | Martin Schmitt<br>Gießener Str. 18<br>35415 Pohlheim<br>Tel.: abends<br>0171-7412414<br>e-mail:<br>esperanto@scsy.de | Esperanto-Gesellschaft Frankfurt /M.<br>**IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01**<br>**BIC: DRESDEFFXXX**<br>Commerzbank, FFM | mit DEB-Beitrag: 80 €<br>Familienmitglied: 40 €<br><br>Nur ESF: 20 €<br>Familienmitglied: 10 € |

## AŬTUNO



**Ora aŭtuno**

Mi paŝas
sur tapiŝo mola,
mi paŝas sur tapiŝo
susuranta,
multkolora,
teksita
el folio
ruĝa, bruna,pale verda,
flavora.

La suno
milde karesas min
kaj la verdajn foliojn
kiujn ankoraŭ
la branĉojn tenas.

Aŭtuno, ora, bela,
sunplena,
aŭtuno beata
venas!

Nedeljka Subotić

# einladung zum klubabend — invito al la klubvespero

Bürgertreff Bockenheim
Schwälmer Str 28
Frankfurt am Main

## donnerstag, d.1.10.2015 — ĵaŭdon, la 1an de okt. 2015

Liebe Mitglieder, Freunde und Interessenten,
wir laden Sie zum nächsten Klubabend ein, der am Donnerstag, den **1. 10. 2015** stattfinden wird.

Karaj membroj, geamikoj kaj interesiĝantoj,
ni invitas vin al la venonta klubvespero, kiu okazos ĵaŭdon, la **1an de okt. 2015.**

**18.30 h**

**SPRACHRUNDE** — **LINGVA RONDO**

**BERUFSBEZEICHNUNGEN**
Eine der ersten Fragen beim Kennenlernen ist die nach dem Beruf.

**VORTOJ PRI PROFESIOJ**
Unu el unuaj demandoj, kiam vi kun iu konatiĝas, estas pri via profesio.

**Ulli Fellmann**

**19.30 h**

## Was wird geschehen? — Kio okazos?

### Wissenschaftliches Quiz mit vielen Experimenten — Scienca kvizo kun multaj eksperimentoj

Herr Klaus Rumrich wird uns mathematische, physikalische und chemische Experimente mit hoffentlich unerwarteten Ergebnissen zeigen. Zwei Teams spielen gegeneinander und werden versuchen, das Resultat des Experimentes vorauszusagen. Dafür muss er vele Sachen mitbringen, weswegen er auf rege Teilnahme hofft. Dieses Quiz ist auch für Kinder geeignet, die sehr gerne mit ihm experimentieren. Ältere Mitglieder dürfen ihm jedoch auch bei den Experimenten helfen.

S-ro Klaus Rumrich montros matematikajn, fizikajn kaj kemiajn eksperimentojn kun (espereble) neantendataj rezultoj. Du teamoj ludos unu kontraŭ la alia kaj provos diveni la rezultojn de la eksperimentoj. Por la eksperimentoj li devas kunporti multe da aferoj, do li esperas ke kiel eble plej multe da homoj venos. Ankaŭ taugus por infanoj, kiuj kutime tre ŝatas eksperimenti kun li. Tamen, ankaŭ maljunuloj rajtas helpi dum la eksperimentado.

**Klaus Rumrich**

## donnerstag, den 15.10.2015 — ĵaŭdon, la 15an de okt. 2015

**18.30 h**

**babbelstunden** — **babilaj horoj**

| geburtstage im oktober | naskiĝtagoj en oktobro |
|---|---|

Michael Woter, 29.10.

**Ni gratulas!**

# Tatuaĵo

- Mi opinias, venis la tempo ke vi ankaŭ estu tatuita, - diris al mi mia edzino post sia reveno de la laboro.
- Ĉu vi freneziĝis? - mi protestis. - Kial mi permesu tatuigi min?
- Hodiaŭ ĉiuj tatuiĝas, vi povas ankaŭ tion fari. Tio estas moderna!
- De kiam estas tatuaĵo modo? - mi embarasita demandis.
- Kiel de kiam?! Vidu – ŝi ĵetis al mia visaĝo iun ilustritan revuon. - Vidu tiun Beckham kiom da tatuaĵon li posedas. Kaj tiu Brad Pitt, kaj rigardu nur tiun basketbaloludanton!
- Sed, karulino, mi estas nek Beckham nek Brad – mi provis devigi ŝin, ke ŝi ankoraŭ pripensu la aferon.
- Ankaŭ mi ne estas Angelina kaj tamen mi regule iras al frizisto, al manikuro, al pedikuro, al masaĝo, kion fari, mi devas sekvi modon. Sed vi nur sidas, trinkas bieron kaj permesas ke via ventro estu pli kaj pli granda. Vidu, mi planas ankaŭ baldaŭ surmeti korpan traboradon sur umbilikon.
„Se vi sukcesos trovi vian umbilikon“, mi pensis, sed mi diris:
- Sed mi ne scias ĉu vere mi lasu min tatuigi. Tion oni ne povas forigi per skrapgumo!
- Mi ne scias, elpensu vi mem, - ŝi estis persistema. - Mia konsilo estas, ke vi tatuigu ion kio ĉiam provokos al vi agrablajn emociojn, kaj kio altiros atenton.
- Sed tio doloras – mi donis mian lastan argumenton.
Ŝi nur malestime rigardis min.
- Nun ne estas la sesdekunua jaro de la lasta jarcento kiam oni pikis per nadloj, tio estas nun modernigita, vi eĉ ne sentos ion ajn.
Tatuisto estis entuziasmigita kiam li vidis min.
- Mi ĝojas, ke ankaŭ vi, ne plu juna viro, perceptas la belecon de tatuado. Kion vi deziras, ke mi tatuu?
- Mi ne scias.
- Mi proponas iun beston. Skorpion aŭ serpenton, ili estas ĉiam en modo.
- Dankon, ne. Nur mankas al mi, ke mi dum nokto vekiĝu kaj sur la brusto vidu serpenton kaj mortu pro la timo.
- Ĉu iun planton, eble rozon?
Tuj mi rememoris pri tiu homo kiu tatuis rozon sur la kolon kaj nun estas dumvive arestita. Mi kapneis.
- Ĉu vi deziras iun patriotan motivon? La nomon de nia ŝtato aŭ emblemon?
- Ne, mi petas. Mi ja estas patrioto, sed nia ŝtato kutimas ofte ŝanĝi la nomon, kaj mi ne deziras esti politike miopa.
- Mi komprenas vin. Eble estus bona iu historia persono?
- Ĉu vi konas iun kiu ne estas kompromitita?
- Sincere, mi ne konas, - konfesis la tatuisto. - Kaj kion vi pensas pri iu ĉina

proverbo? Tiuj estas nun tre ŝatataj ĉe „riĉaj kaj belaj“. Kompreneble ĉio estos ĉine skribita.
„Sufiĉas, ke mi portas ĉinajn kalsonojn kaj ĉemizojn, nur mankas al mi ĉina proverbo“.
- Tamen ne – mi diris.
- Sed vi certe havis en junaĝo iun idolon?
- Mi havis, sed nun li estas arestita. Oni suspektis, ke li trompŝtelis, pro tio tio estus maloportuna…
- Jes, jes… Eble vi ŝatus havi la vizaĝon de via edzino?
- Eble ni tamen pripensu pri la serpento? – mi demandis.
Tatuisto kun kompreno kapjesis, tamen en liaj okuloj spegulis malespero.
- Mi vere ne plu scias, kion mi proponu al vi.
- Ĉu vi havas ion de eterna valoro? - mi demandis.
- Bedaurinde, ne. En Serbio eternaj valoroj estas efemeraj…
Mi febre pensis. Tiam mi rememoris pri vortoj de mia edzino: „Tatuigu ion kio ĉiam provokos al vi agrablajn emociojn, kaj kio altiros atenton.“
- Majstro – mi diris. - Tatuigu al mi unu bierbotelon. Ĝi estu duonlitra.

*Rimarko:*
*Karaj amikoj,*
*vizitante mian hejmolandon, Serbio, mi trovis la supran tekston. Por mi ĝi estis amuziga kaj mi esperas, ke vi ankaŭ ĝuos ĝin. Mi ĝuis ankaŭ mian naskiĝurbon kaj tial mi salutas vin ĉiujn el ĝi. Via Katarina*




*foto ke*

*Preĝejo St Andreas apud la malnova palaco de la reĝo Petar I Karađorđević de Serbio*

***Mallonga historieto***

En la jaro 1961 okazis en Beogrado la fondokunsido de la unuiĝo de la Movado de Senblokaj Ŝtatoj. Tien venis inter aliaj ankaŭ la reĝo de Etiopio, caro Haile Selassie, kiu loĝis en la malnova reĝa palaco. Alveninte li rimarkis, ke tuj apud la palaco troviĝas la preĝejo. Li tre ĝojis pri tio, ĉar li deziris venontan matenon iri al la servo. La akompanantoj silentis.
Post kiam li eniris ili devis labori. La preĝejo iĝis intertempe (en komunista Jugoslavio) ejo por la iloj bezonataj por la laboroj en la ĝardeno: ŝpatoj, forkegoj ktp. La preĝejo estis malpura kaj unu ikono de la ikonostaso mankis – verŝajne iu ŝtelis ĝin! Do...
Ili unue telefonis al la profesoro por la arto de ikonoj ĉe la Akademio de artoj kaj petis lin, fari ion. Dum la nokto la profesoro kaj liaj studentoj pentris novan ikonon. Aliaj purigis la preĝejon kaj petis iun popon sanktigi ĝin kaj fari venontan matenon servon.
Kiam caro venis al la preĝejo, ĉio estis en ordo. Ankoraŭ nun oni povas vidi la nove faritan ikonon en la preĝejo de la serba reĝo.

Katarina Eckstaedt